

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA

n-ro 1/1989

januaro 1989

Invito al la Jarkunveno de la Esperantista Klubo en Praha la 20-an de februaro 1989

P o z v á n k a

na výroční členskou schůzi Klubu esperantistů v Praze dne 20. února 1989.

Schůze proběhne od 18.30 do 20.00 hod. v agitačním středisku v Kodaňské ulici.

Na programu budou zprávy o činnosti, revizní zpráva, návrh nové úpravy členských příspěvků, plán činnosti klubu, volba nového výboru klubu a diskuse.

Přijďte všichni!

Výbor klubu podává návrh nové úpravy členských příspěvků Klubu esperantistů v Praze. Smyslem návrhu je jednak posílit finanční situaci klubu, jednak umožnit starším členům klubu, aby za své celoživotní členství mohli být i nadále členy klubu i bez placení členských příspěvků.

Navrhují se tři kategorie členů klubu, přičemž všichni dostávají Bulteno:

- I – všichni výdělečně činní členové klubu — členský příspěvek na rok Kčs 50,—
- II – učňové, studenti, vojáci zákl. služby, důchodci do 70 let Kčs 30,-
- III – osoby starší 70 let, příznivci, zasloužilí a čestní členové příspěvek neplatí, mohou však dle svého uvážení zaplatit případně jakoukoliv dobrovolnou částku, zápisné – činí jednorázově Kčs 10,-.

Navrhovaná úprava předpokládá zvýšení částky členských příspěvků o 11,5 %. Výroční členská schůze návrh projedná a bude-li schválen, vstoupí v platnost od 1. 1. 1990.

Vážení přátelé, potřebujeme doplnit výbor našeho klubu. Kdo má zájem a čas, přihlaste se. Pamatujte: Jaká je práce výboru, takové jsou výsledky klubu! A vy jistě chcete, aby výsledky našeho klubu byly co nejlepší. Hlaste se již nyní, nečekejte až na výroční členskou schůzi. Přihlášky přijímá na každé schůzi v pondělí Ing. Khail.

Informo por kolektemuloj: la kunveno de Esperantaj kolektantoj okazos en Strážnice de la 7-a ĝis la 9-a de aprilo 1989.

La kunvenon partoprenos ankaŭ oficialaj reprezentantoj de Esperanto-asocioj el socialismaj landoj kaj pluaj eksterlandaj gastoj.

La ĉefaj punktoj de la programo estos: renovigo de la laboro de Kolektanta sekcio de ĈEA, kunlaboro inter E-asocioj de socialismaj landoj je tiu ĉi fakkampo, la kultura programo, la interŝanĝado de esperantaĵoj ktp.

Urbo Strážnice estas tutmonde konata dank' al la ĉiujaraj internaciaj folkloraj festivaloj.

La aliĝilojn, pluajn detalojn ktp. je la adreso:

ESPERANTO, poŝtkesto 34, CS-696 62 STRÁŽNICE.

-vlh-

Mi ŝatas virinojn de malgrandaj figuroj. Malgrandajn. Tial mi edziĝis kun unu el ili. Mi ne diras, ke nur pro tio, sed unu el motivoj tio estis. Mi simple ŝatas malgrandajn virinojn. Nome – mi ŝatis ilin. Nun, kiam mi elektis unu el ili – mi diras: mi ŝatas malgrandan virinon.

Mi ne volas ĉi tie priskribi la motivojn, pro kiuj mi preferas malgrandajn virinojn. Iuj estas tute subjektivaj kaj elparolitaj ili aspektus ridinde.

Antaŭ ĉio – malgranda virino aldonas al la hejmo intimon. Se ŝi paŝas el ĉambro en ĉambron, mi povas havi senton, ke tra la loĝejo moviĝas la sukerujo. Mi konas virinojn, kiuj enirante ĉambron plenigas la pordon. Ili teruras min kiel lavangoj. Estas virinoj, kiuj pelas sin tra loĝejo kiel globfulmoj; oni povas ilin nek supervidi, nek sekvi. Ili estas tuj ĉi tie, tuj tie kaj iliaj transiĝoj ne havas pli multe da logiko, ol la transiĝoj de globfulmo. Ili estas neelkalkuleblaj, se entute iu pensus pri tio elkalkuli ion ne nur pri ili, sed pri la virino ĝenerale. Estas virinoj masivaj kaj senmovaj kiel montaro. Oni povas paroli pri ili nur pere de geografiaj terminoj kaj se vi priskribas – ekzemple nur por vi mem – ilian ekzistadon en la loĝejo, vi devas paroli pri tio, de kie ĝis kie ili etendiĝas.

Mi legis foje en unu libro, ke ie, iu, iam, al iu kisis gracilajn manradikojn. Mi neniam faras tion, ĉar tio estas la afero el libro, sed la ideo de gracilaj manradikoj estas por mi firme interligita kun malgranda virino kaj bonfartigas min kiel muziko.

Estas bone, sidi en brakseĝo kaj postuli de malgranda virino malgrandajn servojn nur pro tio, por ke ni vidu, kiel ŝi stariĝas, kiel ŝi iras, malaperas en la pordo, tuj ŝi revenas, paŝas al ni, eksidas kaj post momento ŝi denove stariĝas, ĉar ni ekpostulis glason da biero, aŭ kulereton kaj iom da marmelado, kaj ŝi denove paŝas, kiel mi jam diris, kiel sukerujo, kio estas – kiel ĉiu komparo – preskaŭ preciza.

Se vi vidas malgrandan virinon, kiel ŝi portas en la trian etaĝon du sitelojn plenajn de karbo, estiĝas ĉe vi noblaj ideoj kaj vi ekpensas pri tio, ĉu vi povus al ŝi helpi. La samon pri grandega virino vi povas eĉ ne konsideri.

Vi miregas, el kie troviĝas tiom da energio en tiu ĉi figureto kaj vi sekvas, kun admiro, kion ĉion portas ĉi tiuj blankaj, gracilaj manradikoj. La malgranda virino ekvekas en la hono bonajn ideojn. Li volus protekti ŝin antaŭ iu ajn danĝero, doni al ŝi helpon kaj kun glavo en la mano eventuale – memkompreneble bildo – stari apud ŝi. Jitka estis nepre malgranda. Ne nur pro tio, ke ŝi sidis antaŭ Břetislav sur ĉevalo, sed pro la sola ideo kaj fakto de forportado. Nur malgranda virino povis al li doni tiel grandan forton, por ke li traveturu inter gardistoj kaj dishaku la ĉenojn. La granda virino povas vekti en ni diversajn ideojn, sed neniam la ideon de forportado. La virinon grandan kaj fortan ni volus neniam forporti kaj ankaŭ ni ne povus.

La malgranda virino grandigas nin. Oni eĉ difinus je kiom, ĉar tie ĉi estas ia simileco kun leĝo de Arĥimedo pri volumeno de akvo elpuŝita per korpo. Mi diras, ke malgranda virino pligrandigas nin je tio, je kio ŝi estas pli malgranda, ke do nia grandeco estas rekte proporcia al ŝia malgrandeco kaj nia forto al ŝia malforto.

Sed ne temas ĉi tie pri fizikaj mezuroj. Malgranda virino grandigas nin morale. Ŝi faras nin kavaliroj, kio estas la sento ja de feŭda origino, sed konvena ankaŭ por viroj progresaj.

Se mi iras kun mia malgranda edzino kaj venas pluvo, mi ĝojas, se mi povas porti ŝian pluvombrelon super ŝia kapo. Se ŝi portas mem sian pluvombrelon super sia kapo, mi aspektas barbare en la okuloj de preterpasantoj, ne dirante pri miaj propraj okuloj, kiuj estas en tiu ĉi momento per ŝia pluvombrelo senĉese danĝerigataj.

Mi parolas pri normala urba pluvo. Sed la malgranda virino ekvekas en ni ankoraŭ pluajn ideojn. Vi volus iri kun ŝi tra iu montara senarbejo, kovrita de eriko kaj esti tie ĉi surprizita de fulmotondro, pluvego laj furiozantaj elementoj, por ke vi ŝin – fragilan kaj timigitan – povu levi kiel la plumeton kaj kuri kun ŝi al duondisfalanta kabanaĉo sub la deklivo, kie vi duope aŭskultus, kiel la fulmotondro malproksimiĝas bruegante ankoraŭ inter la montoj.

En la beletro tio ekzistas. La verkisto eltiros vin sur monton, furiozigos elenentojn por vi kaj preparos por vi sub la deklivo duondisfalintan kabanaĉon. Malgranda virino estas vere timigita kaj ŝiaj okuloj, trans kiuj fluegas la akvo de pluvego, estas dankeme fiksataj al viaj okuloj, trans kiuj fluegas ankaŭ la akvo de pluvego, kaj tio ĉio en kuro, dum en la ĉirkaŭstarantajn pinojn batas fulmoj.

Dum la vive estas ĉio alie. Tio ne estas sur la monta senarbejo kaj nenie proksime estas duondisfala kabanaĉo, kaj absolute ne restoracio. Oni ne povas ankaŭ diri, ke la elementoj estus furiozaj. Pluegas. Pluegas kiel el verŝkruĉo. Kaj vi ambaŭ estas tute malsekaj. Malgranda virino timas ne de la fakto de la fulmotondro, sed de la fakto, ke difektiĝos ŝia frizaĵo. Ne provu ŝin levi kaj ien porti en tia momento. Unue ne estas kien kaj due – ankaŭ plej malgranda virino malseka de pluv-akvo plipeziĝos kaj malĝojiĝos. Ŝi ne fiksas al vi dankemajn okulojn, sed okulojn, kiuj demandas: "Kiu elpensis tiun ĉi ekskurson en tiujn ĉi lokojn?" Kaj kiam vi centprocente scias, ke ŝi, ne diru tion al ŝi. Diru nenion. Ne estas konvenaj vortoj por tiu ĉi situacio. Klopodu nur pri tio, ke vi aspektu pli malbone ol ŝi. Falu teren, makuliĝu per koto, difektu vian veston, sangadu, lamu.

Akceptu aferojn, kiaj ili estas. Vi ne estas en libro, sed en Posázaví, ekzemple. La viro, kiu levas virinon kiel plumeton kaj kuregas kun ŝi sur deklivo, estas elpensita, de la sentoj trans ideoj ĝis fakte fortaj manoj kaj pulmoj. La virino ne estas plumeto kaj ne povas esti kiel plumeto portata. Tio estas bildo, ekzemplo, metaforo, do la afero destinita por tralego kaj ne por farado. Kun la virino en brakoj oni povas dum la edziĝtago transiri domsojlon, sed ne eblas portadi ŝin tra tiu ĉi loĝejo senĉese kaj tute ne trans montaroj kaj tute ne, se pluegas.

La diferenco inter via edzino kaj vi estas en tio, ke se vi legas tiujn ĉi aferojn, tiam via edzino tiun ĉi okazaĵon translokas el la libro en la vivon kaj la rolon de trotanta muskolulo ŝi atribuas por vi, sed vi precize sentas kaj sekve respektas la netransireblan limon, kiu dividas la poezion kaj la veron.

La viro legas la skribaĵon kaj pripensas ĝin. La virino travivas tion kaj memoras.

Se vi vidas viron, kiu dum rigardo malproksimen fermetas okulojn, vi povus certe deklari, ke li estas miopa; se vi vidas virinon, kiu faras la samon, vi ne povas scii, ĉu ŝi estas miopa, aŭ ĉu al ŝi ekplaĉis la fermeto de okuloj en la priskribo de Anna Karenina.

Eli Urbanová

Muŝeto

Sur dorso kun orkestro
muŝeto post fenestro
ĉiam ankoraŭ zumas
senespere, dum ekstere
tegmentojn sun' orumas.
Sur travidebla tundra
malgranda nigra punkto.
Subite sin ekmovas labirinto – -
Perdiĝinto
vojon al suno trovas.

El Verso kaj larmo.

GEEDZIĜOJ PRO LA HEREDAĴOJ

Jan Ŝabka finis universitatajn studojn kaj komencis serĉi fianĉinon. Li estis klera, sed tute sen havaĵo. Pro tio, kvankam li estis juna, li ne serĉis fianĉinon junan sen doto. Li decidis edziĝi eĉ kun pli aĝa vidvino aŭ maljunulino, nur se ŝi estos sufiĉe riĉa.

Kaj tiel okazis. Baldaŭ li komencis "amindumi" vidvinon, sinjorinon Marta Kuželková, kiu heredis post morto de sia edzo grandan domon, vinberejon kaj fine eĉ sufiĉe da mono. Kvankam ŝi estis multe pli aĝa, post duonjaro okazis edziĝfestoj.

La mielmonato, ne tro gaja por la novedzo, baldaŭ finiĝis. Estis la jaro 1582, jaro, dum kiu la urbo Praha suferis pro pesto. Kaj la pesto kaŭzis ankaŭ morton de la edzino de Ŝabka.

Sur la mortlito ŝi donis ĉiun sian havaĵon al la edzo. Tiel Ŝabka gajnis ne nur liberecon, sed ankaŭ riĉecon.

Juna vidvo, riĉa urbano, vivis honeste kaj mastrumis. Li aĉetis pluan vinberejon, bieneton kaj lupolejon, Krome, li kaŝe serĉis novan fianĉinon.

Post du jaroj li denove edziĝis. Tiukaze li jam elektis fianĉinon ne nur riĉan, sed ankaŭ junan kaj belan. Per la geedziĝo kun Milada, Ŝabka gajnis pluan domon kaj du vinberejojn.

Ŝabka tute ne havis ideeton, ke Milada konsentis kun la geedziĝo ne pro la amo, sed pro la devigo de sia patrino Apolena. Li amis sian edzinon Milada, sed ŝi plue sopiris al Ondra, filo de tanisto Veleš. Milada sciis, ke Ondra havas multajn amikinojn, vizitas trinkejojn kaj sufiĉe trinkas. La patrino Apolena pro tio rekomendis al ŝi forgesi Ondran. Vane.

Ŝabka havis multajn zorgojn kun la granda havaĵo, li estis ofte ekster la hejmo. Tion eluzadis Ondra, vizitante Miladan.

Nur post tri jaroj servistino ĉion diris al Ŝabka. Li neatendite revenis hejmen, kun la pafilo eniris dormoĉambron, sed en la momento de pafado Ondra ĵetis kontraŭ Ŝabka kusenon. La kuglo tratis plafonon kaj Ondra sukcesis forkuri. Ŝabka forpelis sian edzinon kaj ŝian patrinon el la domo. Poste li baldaŭ malsaniĝis kaj ne tro aĝa mortis.

Juna vidvino Milada ĉion heredis kaj kun la patrino Apolena mastrumis. Ondra nun tiom persvadis la vidvinon, ĝis ŝi edziniĝis al li.

Tuj komencigis "infero" en la domo. Unue Ondra forpelis sian bopatrinon al la domo. Milada sian patrinon defendis. Pro tio Ondra batis ŝin. Kaj batis poste sufiĉe ofte. Anstataŭ mastrumi, Ondra vizitadis kun siaj gajaj kamaradoj trinkejojn, disĵetante tiel la havaĵon.

Eĉ maljuna Veleš ne sukcesis racie paroli kun sia filo; male, ebria Ondra prenis la pafilon kaj nur lastmomente Milada sukcesis savi sian bopatron.

Apolena sekrete, vizitadis sian filinon kaj rakontis al ŝi pri maljunulino, kiu scias diveni laŭ vakso. Laŭ la vakso la vivo de Milada estos malfeliĉa. Nura solvo estus aldonadi po iomete venenon en la manĝaĵon, ĝis Ondra mortos.

Post nelonge venis Ondra hejmen kaj ekvidante tie la bopatrinon, li prenis hakilon kaj ĵetis ĝin al Apolena. La hakilo trafis ŝian kapon. Matene Apolena mortis.


Tribunalo decidis la delikventon pendigi. Tio baldaŭ okazis.

La bela vidvino post unu jaro (kaj post grandaj spertoj) edziniĝis al pli aĝa urbano. Kiu pli frue mortis, kiu heredis, jam ne estas konate.

KRUCENIGMO Ivan Slávik

La solvon de la krucenigmo ni petas sendi al Květa Hubnová, U průhonu 6, 170 00 Praha 7, ĝis 1989-02-15.

Sukcesaj solvintoj ricevos malgrandan premion.



Horizontale:

1. Dua parto de la kaŝfrazo. 2. Konformiĝi je tio, kion iu ordonas aŭ deziras – mara blanka kaj griza naĝbirdo kun longaj flugiloj – prepozicio esprimanta celon, destinton, personon ktp. – areo germane – part' de suba membro de homa korpo, eke de genuo ĝis piedo. 3. Duobla organ' sekrecianta la urinon – spino de la ŝipo – ĉarmegis estigante entuziasman admiron – unua hom' – per modo de dioj. 4. Prepozicio de direkto, celo ktp. – apartenanta al koko – senutila superfluaĵo – unuo angle – aŭtosimbolo de Nederlando. 5. Nitrogeno – subtera ĉambro – ekstrema parto de brako – hidrogeno – fari angle – prefikso antaŭ fizikaj unuoj signifanta kvanton 10^{12} – oksigeno. 6. Fadenforma epiderma elkreskaĵo sur la kapo – antikva durada veturilo – mebl' por dormi aŭ kuŝi – longa kava cilindroforma objekto – bezonanta ripozon. 7. Granda uj' por kolekti voĉdonilojn – laste, definitive – subita, plej ofte senkaŭza amasa terur' – sin amuzi, distri – per propraj fortoj, sole. 8. Unua parto de la kaŝfrazo.

Vertikale:

A. Sankta libr' de Mahometanoj – korna piedbaz' de ĉevaloj. B. Insekt' produktanta mielon – vira nom'. C. Adverbo uzata por anonci ion, ekkrii por atentigo – centra, esenca parto de io. D. Virseksa pronomo – parto de la korpo inter kapo kaj trunko – mllongigo de franca. E. Amata kaj amanta persono – la tuto de la koncernantaj aĵoj. F. Lumplena – germana verkisto (Buddenbrooks). G. Kokina produkto – ronda ventroforma uj'. H. Molibdeno – amfibia saltanta besteto – infana saluto. I. Juvel-ŝton' el lakteblanka aŭ blueta siliko – prepozicio montranta ekz. konformecon al ies sento aŭ volo. J. Unuafoje aperanta, ne uzita – loĝant' de Hindujo. K. Mult-edr' kies la du bazoj estas egalaj paralelaj poligonoj kaj la flankoj paralelogramoj – montra pronomo. L. Valora metal' – manier' de estado (situacie) – mallongigo por "komparu" en vortaroj. M. Unu el la memkonstruitaj ŝipoj de T. Heyerdahl – organo de vidkapablo. N. Amuzu, distru vin – elefanta ost'. O. Karul' – lirika laŭdpoemo. P. Aŭtosimbolo de Blansko – produkt' de abeloj – infan'. R. Regula aranĝ' de aferoj – urba rela veturilo. S. Restaj' el disfalinta konstruo, kastelo – ofta arb' parenca je platano. T. Organo de aŭdkapablo – nobla homa sento.

I. Slávik

La programo de kunvenoj de la Esperantista klubo en Praha

Januaro

- 9.1. 35 jarojn esperantisto - J. Ondráček
16.1. Novaĵoj en la Esperanto-movado - J. Patera
23.1. Libera tribuno
30.1. Ĉeĥa poezio en Esperanto - E. Seemannová

Februaro

- 6.2. Gramatika ripetado
13.2. Libera tribuno
20.2. Jarkunveno de la klubo
27.2. Novaĵoj en la Esperanto-movado

Marto

- 6.3. La Internacia Tago de Virinoj
13.3. Libera tribuno
20.3. Gramatika ripetado

Aprilo

- 3.4. Novaĵoj en la Esperanto-movado

La kunvenoj okazas ĉiulunde inter la 18.30 kaj 20.00 horo en la Agitcentro en Kodaňská-strato (angulo de Horská-strato). Eksterlandaj gastoj estas bonvenigataj.

Gratulojn al tiuj niaj membroj, kiuj en la nuna jarkvarona atingas gravan vivojubileon:

en januaro:	Alena Dufková Marie Halamová František Haszprunár Ing. Karel Koubský Dana Moravčíková Jaromír Orsáček Ludmila Tomčíková Dr. Gustav Singer	en februaro:	Jarmila Králová Václav Němeček Jaroslava Štěničková
		en marto:	Eva Hoffmannová Denčo Rusnakov Feliĉon, sanon kaj pacon!

Prosíme všechny učitele písemných kursů, aby úspěšné absolventy z Prahy a blízkého okolí ohlašovali na naši adresu, abychom jim mohli nabídnout členství v KEP.

Předem děkujeme.

Výbor KEP

Během roku 1988 nám pošta vrátila zpět zásilky pro tyto členy: Prokop Beneš, Marie Fejteková, Jindra Černohorská, Květuše Lazecká, Pavla Pinkasová.

Prosíme sanideány, kteří je znají, aby je upozornili, že klubu nenahlásili svoji novou adresu.

Nové členské legitimace. – Pokud v členské legitimaci KEP již nemáte místo pro nalepování známek, nebo jste ji ztratili, napište nám, rádi vystavíme novou. Svazové legitimace vystavuje výhradně s-anino Vondráková, sekretariát ČES, Jilská ul. 10, 110 00 Praha 1, tel. 22 02 62.

Děkujeme s-anu J. Rybářovi za dar – 10,- Kč

Výbor KEP

BULTENO – eldonas Esperantista Klubo en Praha, baza organizaĵo de ĈEA, p.k. 1069, 111 21 Praha 1 – por siaj membroj.